
La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-21 n-ro 423

# Seksrilatoj perdos signifon



Ekstremistoj atakis Kontinentan Hotelon en Kabulo

Okcidenta Irano spertis 336 tertremojn en dek tagoj

Ganao: eksigo, perforto, Human Rights Watch malkaŝas la ĉiutagan vivon de la GLATa komunumo

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Ekstremistoj atakis Kontinentan Hotelon en Kabulo
*Ekstremistoj ostaĝigis plurajn homojn kaj kelkaj estis mortigitaj aŭ vunditaj p. 03*

Okcidenta Irano spertis 336 tertremojn en dek tagoj
*23 tertremoj superis la rikteran gradon 4, kaj sep tertremoj superis la gradon 5 p. 03*

Ganao: eksigo, perforto, *Human Rights Watch* malkaŝas la ĉiutagan vivon de la GLATa komunumo
*Pli ol cent atestoj de samseksemaj personoj p. 04*

Seksrilatoj perdos signifon
*Almenaŭ por generi idojn p. 05*

Programeto promesas “kontrakton” por seksumado
*Laŭlege konsenti pri seksumado p. 06*

Submarino D-2: sinko en la pasintecon
*Ŝarko de la nordaj maroj p. 07*

Hodiaŭe
*Imre Madách; Sándor Beier; kaj Pingveno p. 09*

# Ekstremistoj atakis Kontinentan Hotelon en Kabulo

La Afgania Ministerio de Eksterlandaj Aferoj diris sabate [20 jan 2018], ke tiuvespere ekstremistoj atakis la Kontinentan Hotelon en la ĉefurbo Kabulo.



La Ministerio de Eksterlandaj Aferoj diris en deklaro, ke la atako okazis nelonge post la kunveno pri informadika teknologio kun ĉeesto de ĉirilataj oficialuloj el diversaj provincoj en la hotelo. La deklaro diris, ke la atakantoj kun armiloj eniris la kuirejon de la hotelo.

La vidintoj diris al la ĉina novaĵ-agentejo *Xinhua* [新华社 xīnhuáshè], ke la atako okazis je ĉirkaŭ la 9-a horo vespere, kaj ili aŭdis eksplodon de grenado kaj pafadojn el la hotelo. Lokaj sekurecgardistoj diris, ke ankoraŭ iras batalo inter la sekurectrupo kaj la atakantoj. Bone informita persono diris, ke la ekstremistoj ostaĝigis plurajn homojn kaj kelkaj estis mortigitaj aŭ vunditaj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Okcidenta Irano spertis 336 tertremojn en dek tagoj

La Irana novaĵ-agentejo raportis, ke direktoro de la seismologia centro en la Irana okcidenta provinco *Kermanshah*, Forouzi, diris sabate [21 jan 2018], ke ekde la 11-a de januaro en la provinco okazis 336 tertremoj. La unua tertremo okazis je la 10-a horo la 11-an de januaro laŭ loka tempo kaj la lasta okazis sabate matene je la 10-a horo.



Forouzi diris, ke la intenseco de 23 tertremoj superis la rikteran gradon 4, kaj sep tertremoj superis la gradon 5. Li aldonis, ke estas malgranda ebleco, ke okazos tertremo kun la intenseco super la grado 5,5 en la regiono, tamen estos malgrandaj tertremoj en la venonta monato.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Ganao: eksigo, perforto, *Human Rights Watch* malkaŝas la ĉiutagan vivon de la GLATa komunumo

La NRO *Human Rights Watch* alarmas pri la perfortaĵoj suferitaj de la ganaaj GLATuloj kaj kuraĝigas la registaron, ke ĝi abolu sian malnovan kontraŭ-GLAT-an leĝon.



La abomenindaj rakontoj pluiĝas. *Human Rights Watch* kolektis pli ol cent atestojn de samseksemaj personoj por realigi tiun 72-paĝan studaĵon nomatan «*No Choice but to Deny Who I Am: Violence and Discrimination against LGBT People in Ghana*» («Mi devas nei, kio mi estas»: Perforto kaj diskriminacio kontraŭ la GLAT-aj personoj en Ganao).

«Laŭ la loĝantaro, la samseksemuloj estas posedataj de malbona spirito, kiu alportas malbonaĵon», komentas lesbanino. Alia rakontas, ke mesaĝo radio-elsendita petis ŝian arestadon, kurigante la famon, ke ŝi kulpas pri la manko de akvo en la vilaĝo, ĉar ŝi estas «sorĉistino», ke ŝi kuŝas «kun ĉiuj junulinoj de la komunumo». Konsekvenco: grupo da viroj penetris dumnokte en ŝian hejmon, kaj senvestigis ŝin por kontroli ŝian sekson. Ili trenis ŝin eksteren kaj verŝis benzinon al ŝi proksime de tendarfajro: «Ĉiuj, kiujn mi fidis, estis tie. La ĉefo de la kvartalo, la pastoro, la policistoj… Mi komprenis, ke mi ricevos helpon de neniu». Aliaj rakontas pri senigo de nutraĵoj, agresoj per maĉeto fare de familianoj kaj ke ili devas senĉese kaŝiĝi. Kaj konsole kiujn ili trovas en la GLAT-a komunumo, kiu reprezentas «familion»?

**Ĉu favora kunteksto?**


Artiklo 29 de la Punkodo, kiu datiĝas de la kolonia epoko, diras, ke ĉia seksrilato alia ol rilato peniso-vagino estas delikto. Tamen, Nana Akufo-Addo, prezidento de Ganao, opiniis en decembro 2017, ke samseksemo povus fariĝi laŭleĝa, kondiĉe se la popolo postulas tion. Tiu deklaro estigis protestmovadon de la religiaj aŭtoritatoj.

La raporto de *Human Rights Watch* konsistigas premrimedon por postuli de la ganaa registaro, ke ĝi malkrimigu samseksemon, kondamnu publike la perfortaĵojn suferitajn de la GLATuloj, kaj persekutu la kulpintojn ĉe tribunalo. La NRO memorigas, ke «dum la pasintaj jaroj, male al siaj najbaroj, Ganao ne adoptis aranĝojn por rigidigi la punojn kontraŭ la konsentitaj samseksemaj rilatoj, aŭ por puni specife la seksrilatojn inter virinoj».

Neniam Milito Inter Ni

# Seksrilatoj perdos signifon

Almenaŭ por generi idojn, seksrilatoj baldaŭ povus fariĝi superfluaj, opinias usona bioetikisto. Kiel konsekvenco el evoluoj en la genetiko kaj en la esplorado pri praĉeloj li antaŭvidas la finon de la natura generado de infanoj.



Henry T. Greely publikigis libron kun la titolo "*La fino de seksumo*" por atentigi ke ni ne vere perceptas ke la homaro staras ĉe la sojlo de granda ŝanĝiĝo, nome direkte al nova medicino de genero.

Temas pri progresoj en du esplorkampoj: Esploro de praĉeloj kaj genetiko. Ĉe musoj oni jam sukcesis igi el haŭtoĉeloj praĉelojn - kiuj sekve estas pludisvolveblaj al spermo kaj ovoĉeloj kaj ankaŭ al idoj. Aliflanke la genaro de pluraj embrioj relative rapide povas esti analizata pri konataj genmalsanoj aŭ riskoj. La prezoj por tiaj analizoj verŝajne plu malaltiĝos.

La konsekvenco de tio ne estos iuj superbeboj sed iom pli sanaj infanoj. Nome oni havos la laŭeble plej sanan infanon, elektitan el centoj da embrioj de la sama paro kaj faritan el simplaj specimenaj ĉeloj. Kaj tio okazos ne nur sen koito, sed tute sen naturaj spermo kaj ovoĉeloj. Kaj kun potenciale multaj zorgoj kaj sanriskoj malpli, por kaj la patrinoj kaj la infanoj.

Kaj tio ne egalos al genetike tajlorataj idoj: Se ambaŭ gepatroj havas bluajn okulojn, ili tamen ne ricevos infanon kun brunaj okuloj. Aŭ infanon kiu estus multe pli granda, pli bela aŭ pli inteligenta ol la gepatroj mem - io tia estus multe pli granda paŝo el socia kaj medicina vidpunktoj, diras la aŭtoro. Kaj tial tio ankoraŭ dum longa tempo ne okazos - tute sendepende ĉu tio teknologie eblus. Sed li ja celas simple la plivastigon de la hodiaŭ jam praktikata fekundigo en vitro.

"Al nefekundaj paroj, kiuj deziras infanon, oni verŝajne koncedus sen granda diskuto la eblecon por tio", kredas la profesoro pri bioetiko. Ĉar - se la metodo estas konsiderata sekura - tio ne estas granda paŝo: Kial halti ĉe certaj formoj de nefekundeco se disponeblas solvo - kaj se principe tiam okazas la samo kiel ĉe la envitra fekundigo.

Samtempe la procedo eĉ precipe por virinoj estus multe malpli pena kaj malpli danĝera por la sano. Ne plu necesus hormona kuracado. Oni bezonus nur kelkajn haŭtĉelojn.

El racia vidpunkto do estas kelkaj argumentoj por tio, li opinias. Sed samtempe en tiu malgranda diferenco kaŝiĝas revolucia potencialo. Subite virinoj - kaj same viroj - povus fariĝi gepatroj multe pli malfrue kaj kun malpli da riskoj, eventuale samseksaj paroj povus generi komunajn infanojn, kaj kelkaj ĉeloj sufiĉus por igi iun nedezirate patro aŭ patrino.

La homoj kompreneble devas konatiĝi kun la nova metodo por kompreni kaj akcepti ĝin. "Kiam la unua infano tiel generita naskiĝos, tiam estos tro malfrue por trankvila diskuto. Tiam regos ŝoko, tiam aperos emociaj reagoj, registaroj rapide enkondukos novajn leĝojn sen esti bone pripensintaj ĉion", li diras.

Ĉu tio okazos post dekkvin aŭ tridek jaroj, tion oni hodiaŭ ne povas diri, sed necesos havi publikan debaton pri tio, por permesi ideajn ludojn kaj formi opinion - pri tio kiu havu aliron al la metodo, pri kiuj malsanoj aŭ ecoj entute oni rajtos serĉi aŭ kiel la sansistemo traktu la novajn eblecojn. Ĉu la metodo servu nur al riĉuloj aŭ al ĉiuj?


La aŭtoro deziras ke ni ekkonu ke tiu ŝajne fora estonteco estas pli proksima ol ni kredas por ke ni diskutu pri tio. Kaj li ne vere kredas ke pli vasta apliko de envitra fekundigo signifos la finon de la homa seksumado por havi infanojn.

Esperanta Retradio

---

# Programeto promesas “kontrakton” por seksumado

Norveglando planas plibonigi sian leĝon kontraŭ seksperforto, kaj tio instigis, ke nederlanda ekfirmao kreis programeton – por poŝtelefonaparato – kiu ebligos al la homoj laŭlege konsenti pri seksumado.




La programeto *“LegalFling”* ebligas al la uzantoj “agordi” multnombrajn trajtojn pri iliaj preferoj kadre de seksrilatoj, kaj registras tion je ia koncerna jura agordo.


Uzante la teĥnologion *“blockchain”* (tiun de la pagosistemo Bitmono), la programeto estas tute imuna kontraŭ nerajtigitaj ŝanĝoj.

Atendante aprobojn de *Apple* (*iOS*) kaj *Google* (*Android*), la surmerkatigo de *LegalFling* estas planata por okazi post tri semajnoj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Submarino D-2: sinko en la pasintecon

Kion fari en Sankt-Peterburgo, se vi jam plurfoje vizitis la Ermitejon, esploris ĉiujn palacojn kaj povas ekzakte diri nombron de la lanternoj sur la *Nevskij*-avenuo? Se vi ŝatas la teknikon kaj pretas devojiĝi de la banala turisma itinero, jen mia sugesto – iru al *Vasilevskij*-insulo, kie atendas vin la vera submarino-muzeo. Kredu min, vi akiros enviindajn rememorojn.



**Al la Finna Golfo**

Tio okazis en 2007. Mi eniris la metroon en la centro de *Nevskij*-avenuo kaj dek minutojn poste jam surteriĝis je la transa bordo de *Neva*. Post plia kvaronhoro itinera taksio alportis min al la celloko. La mara stacidomo kaj belega vido al la Finna Golfo jam estas sufiĉa kialo por veni tien, sed mi celis alian vizitindaĵon.

Tricent paŝojn norden kaj jen, fine de la strato *Ŝkiperskij protok* (Ŝkipera enfluanto), rande de la golfeto de *Galernij farvater* (Galera navigovojo; de la nederlanda *vaarwater*), sur la betona soklo kuŝas submarino *Narodovolec*, transformita al muzeo. Ĉu ni eniru?

**Ŝarko de la nordaj maroj**

Civilulo ne kutimas plonĝi en klapopordojn, do al la submarino oni alkonstruis malgrandan akceptejon kun kelkaj ĉambroj. La estro renkontis nin tie. Post ekscii ke mi venis el la malproksima Tjumeno la grizhara veterano enmanigis al mi du poŝkalendarojn kun submaristaj tostoj kaj nomkarton kun lakona surskribo: “Anatolij Kuzmiĉ Savĉenko, kapitano de la 2-a rango, direktoro de la muzeo”.

En vojaĝo tra la sep sekcioj de *Narodovolec* akompanis nin ne malpli solida kaj erudicia kapitano, preta rakonti pri ĉiu bolto de sia kara submarino.

Ĝi estis konstruita en 1929 kaj apartenas al la unuaj sovetiaj submarinoj. Ĝiaj karakterizoj estis enviindaj por multaj alilandaj konkurantoj. Duobla nitita korpuso estis farita el la plej altkvalita ŝtalo fabrikita ankoraŭ en la antaŭrevolucia periodo.

Speciala cisterno ebligis subakviĝi en 30 sekundoj (anstataŭ 180 antaŭe) je profundo ĝis 90 metrojn.

Fuelrezervoj sufiĉis por 28 tagoj de la aŭtonoma navigado kaj danke al moderna sistemo de aera regenerado oni povis troviĝi subakve ĝis 72 horojn – trioble pli ol antaŭe.

Sur la ferdeko la D-2 portis 14 torpedojn, per kiuj ĝi senavare regalis la renkontitajn naziajn ŝipojn, droniginte almenaŭ unu el ili. Tio estis bonega submarino, militservo en kiu estis la afero honora, glora kaj... ege malfacila.

**La terura vorto *galjoen***

Vere, mi ne povas imagi homon kiu propravole akceptus loĝi en tiu malvasta, spirmanka, tute malhoma ladskatolo! Ĉiu el la sep sekcioj superplenas je diversspecaj mekanismoj, do tuj kompreneblas ke en la ŝipo regas ili dum la homoj nur pene klopodas enspaciĝi en restintajn lokojn. Iu trafe diris, ke troviĝi en submarino estas kvazaŭ loĝi ene de horloĝo.

La litoj pendas po tri en vico kaj se vi ne estas nano, eblas dormi en ili nur sin faldinte trifoje. Ili troveblas eĉ en la torpeda sekcio, kie oni devis dormi apud la torpedoj, do laŭvice – dum unu submaristo dormis, alia deĵoris. Oni uzis ĉiun centimetron, eĉ tagmanĝa tablo centre de la sekcio servis ankaŭ kiel triopa lito. La oficiroj tagmanĝis ĉe aparta tablo, sed ankaŭ ĝi kaze de bezono transformiĝis – al la kirurgia. La kuracista sako apudis.

La vivo en submarino ĝenerale malkonvenas al la puremuloj kaj dorlotitoj. Eĉ tre simpla afero kiel vizito al GALJOEN (en la nederlanda: pruo, ĉar tie oni faris ŝipnecesejon) povus havi terurajn sekvojn. Kaŭzas tion premodiferenco, kiu malebligas rekte forĵeti la enhavon de la subakva klozetpelvo al la maro.

Do ĉiufoje antaŭ premi la forĵetpedalon oni devis fermi la specialajn klapojn kaj per pumpilo levi la premon en akumula balono. Novico, forgesinta tiun regulon, anstataŭ ĝua senpeziĝo ricevis altan fontanon el ĉio, kion lasis li kaj la antaŭaj vizitantoj.

Mi aldonu ke forigi tiujn aromajn memoraĵojn estis tre malfacile – por ĉiu el 53 ŝipanoj estis rezervitaj nur kvar litroj da akvo tage. Ĉu vi ankoraŭ miras ke la sovetiaj submaristoj atakis la faŝistojn kun terura furiozo?

**Feliĉa sorto**

Tamen la D-2 kaj ĝiaj skipanoj havis vere bonan sorton. El la ses submarinoj de tiu ĉi serio unu pereis dum ekzercoj, alia malaperis en 1942, la tria estis dronigita de malamikoj, la kvaran dronigis ĝia skiparo post la falo de Sebastopolo, la kvinan oni distranĉis por ferrubaĵo jam post la Dua mondmilito.


La D-2 ne nur postvivis ĉiujn batalojn, sed eĉ transformiĝis en 1994 en la muzeon – unu el la plej interesaj en Sankt-Peterburgo.

**Fremda heroo**

Revenvoje al la mara stacidomo mi haltis ĉe alia batalmonumento – sur granita soklo staris torpedŝalupo, impetanta al la Finna golfo. Ĉu tio estas G-5 aŭ 123bis el Tjumeno, kie oni fabrikis ilin dum la Dua mondmilito? Post ĉirkaŭrigardi ĝin mi trovis nur memorŝildon informantan ke tio estas monumento al la ŝalupistoj de Balta maro. Hm...

Hejme mi montris la fotojn al fakuloj kaj ilia konkludo estis senesperiga: en Peterburgo staras torpedŝalupo *Komsomolec*, do mia espero vanis. Kion fari? Ĝi estas fremda heroo por mia urbo, sed kara memoraĵo al ĉiu ŝatanto de la tekniko kaj historio ĝenerale, ĉu ne?

Stano BELOV
stanobelov.blogspot.com



## Imre Madách

**Imre Madách (naskiĝis la 21-an de januaro 1823, mortis la 5-an de oktobro 1864) estis hungara poeto.**

**En Esperanto aperis:** *La Tragedio de l' Homo*.

**Vikipedio**

## Sándor Beier

**D-ro Beier Sándor naskiĝis la 28-an de marto 1913 en** *Gheorgheni* **kaj mortis la 21-an de januaro 1992 en Kluĵo. Li estis Esperanto-beletristo, konata sub la pseŭdonimo Darázs Bérci, Sándor Héthelyi kaj estas reprezentita per poemo en Esperanta antologio.**

**En Esperanto aperis pluraj verkoj.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

*Pygoscelis antarctica*.

**Vikipedio**